# ATEISMO

## BULTENO DE ATEISTA TUTMONDA ESPERANTO-ORGANIZO



**Religia amasiĝo, virusa disvastiĝo** *(Foto de: PTI)*

**Majo 2021**

N-ro 32 | www.ateisto.org

# VORTO DE LA REDAKTORO

Vi legas jam la trian numeron de la bulteno preparitan dum la tutmonda kovida pandemio. Kvankam la situacio signife pliboniĝis en Eŭropo kaj Nordameriko, aliaj mondopartoj baraktas kun altaj niveloj de infektiĝoj. Neniu lando spertas tiom malbonan situacion nun kiel Barato. Tie aperas ĉirkaŭ 200 mil novaj kazoj ĉiutage, mankas oksigeno kaj hospital-spaco por multaj pacientoj, kaj miloj ĉiutage mortas pro Kovido. Nur 12% da homoj estas vakcinitaj, nur 3% kun ambaŭ dozoj. Barato estas unu el la plej religiemaj landoj en la mondo, sed nek Dio nek dioj helpas en tiu ĉi krizo. Fakte religio estas unu el la ĉefaj kaŭzoj de la nuna terura ondo.

Malgraŭ forta kazo-kresko en marto, la hindu-naciisma registaro de Narendra Modi permesis la okazigon en aprilo de la ĉi-jara Kumbh Mela, grandega hindua festivalo. Ĝi kunvenigis milionojn da pilgrimantoj al la bordoj de la Gango en Haridvar en la nordbarata ŝtato Utarakando. Distancigado tute ne eblis. Nesurprize, multaj infektiĝis kaj disvastigis la viruson vojaĝante aŭ alveninte hejmen. En vilaĝo en Madjapradeŝo, 60 el 61 revenintoj estis infektitaj! En Utarakando mem, dum 25-taga periodo en aprilo, okazis kresko de 1800%(!) en Kovid-kazoj certe ligita kun la Kumbh Mela. Barataj amaskomunikiloj raportis kun konsterniĝo pri la festivalo kaj ĝiaj postsekvoj – tute prave, ĉar ĝi ja montriĝis esti superdisvastiga evento.

Religiaj homoj kiel tiuj, kiuj ariĝis en Haridvar, klare ne vidas la senutilon de religio kaj religiaj agoj fronte al malsanoj kaj epidemioj. Multaj el ili verŝajne kredis, ke Dio aŭ iu(j) dio(j) kaj la sankta akvo de la Gango protektos ilin dum ilia partopreno en la festivalo. Tiel evidente pensis la dekmiloj da "sadhuoj" tie, asketoj, kiuj vivas per almozoj kaj iradas de unu loko al alia. En fotoj, oni vidas, ke preskaŭ neniuj el ili portis maskojn dum la Kumbh Mela. Samtempe, multaj religiuloj sendube pensas, ke la pandemio estas la volo de Dio (eble puno) – tamen ĉu Dio volas la pandemion, sed ankaŭ ŝirmas homojn kontraŭ ĝi kaj respondas al preĝoj por protekto kaj vivsavo?


Ĝis nun pli ol 165 milionoj infektiĝis kaj 3,4 milionoj mortis tutmonde. La plej granda religia ariĝo en la mondo kontribuis al serioza kresko de infektiĝoj en Barato. Dia protekto, dia atento al preĝoj ŝajne malestas. Kion tio diras? Aŭ Dio ial intence estigis la pandemion aŭ Dio estas senpova aŭ indiferenta al homoj … aŭ simple ne ekzistas – en ĉiu el tiuj ĉi kazoj, religio senutilas! Kio certe utilas estas scienco, per kiu oni rapide kreis vakcinojn por protekti kontraŭ la viruso kaj fine venki ĝin. Ankaŭ utilas science bazitaj reguloj pri maskuzado kaj distancigado. Se la pandemio okazas pro dia volo, kiel povas esti, ke homa kreaĵo kiel vakcino sukcese kontraŭagas dian potencon?! Eĉ maskoj faras tion! Grava funkcio de religioj estas eltiri el Dio/dioj bonon por homaro – sed la pandemio montras, ke ili ne kapablas tion fari pro kialo plene evidenta al ni ateistoj!

# Ateistoj: ekstaru por esti nombrataj!

*Anna Lowenstein (Britio)*

La 21an de marto okazis la popolnombrado en Britujo. Unu reprezentanto en ĉiu loĝejo en la lando devis plenskribi demandilon, aŭ papere aŭ prefere rete, kun informoj pri la homoj, kiuj loĝas ĉe tiu adreso. Aperis demandoj kompreneble pri la aĝo, sekso, profesio, eduknivelo, sed ankaŭ pri la etna deveno, seksa orientiĝo kaj religia kredo. Tiuj lastaj demandoj estis nedevigaj.

Iom antaŭ tiu dato la brita humanisma asocio, kiu nun nomiĝas Humanists UK, faris reklamkampanjon por kuraĝigi la homojn prezenti sin kiel "Neniu religio". Ĝi klarigis, ke kvankam multaj homoj en Britujo ne plu havas religian kredon, ili tamen aŭtomate indikas, ke ili apartenas al unu aŭ alia religia grupo. En multaj okazoj temas pri kultura aparteno aŭ familia fono pli ol efektiva kredo. Tial la rezultantaj ciferoj donas nerealisman bildon pri la proporcio de religiuloj en la lando. Tio havas realajn kaj nedezirindajn sekvojn, ĉar tiuj ciferoj estas uzataj por pravigi ŝtatan financadon de religiaj lernejoj kaj de religiaj prizorgantoj en malsanulejoj, krome por la daŭrigo de religiaj agadoj en lernejoj, la ĉeesto de episkopoj en la supera ĉambro de la Parlamento, kaj simile.




*Britoj povas elekti "Neniu religio" en popolnombrada enketilo (Humanists.org.uk)*

Posta reklamo de Humanists UK aludis al pli malfacila situacio. Ĉar nur unu reprezentanto en ĉiu loĝejo devas plenskribi la formularon por ĉiuj ĉe la sama adreso, ne eblas teni sian respondon al tiaj tiklaj demandoj privata. Estas facile imagi situacion, en kiu ekzemple la patro plenskribas la formularon, sed aliaj membroj de la familio ne deziras informi lin, ke ili forlasis la religion – por ne mencii eĉ pli delikatajn demandojn pri seksa orientiĝo aŭ genra identeco.

Tial eblas, ke homoj dezirantaj respondi sekrete kiel nereligiaj aŭ kun aparta seksa orientiĝo rajtas peti individuan kodon de la Oficejo de Naciaj Statistikoj, kaj plenskribi sian propran sekcion de la formularo en la reto. Eblos fari tion eĉ post kiam la formularo jam estis plenskribita. Informoj senditaj pere de individua kodo nuligos tiujn senditajn de la reprezentanto ĉe la koncerna adreso, kaj aliaj familianoj ne scios, ke tio okazis.

Mi mem, vidinte la reklamon de Humanists UK, efektive sentis min en embaraso. Mi kompreneble estas senreligia, kaj mi volus indiki tion por la popolnombrado, sed samtempe mi ne dezirus nei mian judan identecon. Ŝajnis al mi, ke mi devos elekti aŭ unu aŭ la alian. Sed kiam mi plenskribis la formularon en la reto, mi trovis, ke eblas mencii mian judecon en la sekcio rilata al etna deveno. Tuj kiam mi ektajpis la literojn JE aperis la vorto "Jewish", kio montras, aŭ ke la kompilintoj de la formularo jam antaŭvidis tian eventualan respondon, aŭ ke multaj homoj jam faris same kiel mi. Tial mi senprobleme povis indiki la elekton "Neniu religio", kiam mi plenskribis la sekcion pri religiaj kredoj.



# Ĝis kiu grado vi kaŝas vian ateistecon?



**Renato Corsetti (Italio)**

Mi estas italo kaj sekve de la tempo, kiam falis la Roma Imperio, ni italoj ne plu kredas je iu ajn granda mondsava ideo: komunismo, kapitalismo, katolikismo, ateismo, ktp.

Kvankam la tuta mondo pensas, ke Italujo estas katolika lando, kaj la eklezio evidente insistas pri tio, eĉ la maljunaj virinoj, kiuj vizitas preĝejojn havas en angulo de sia menso la dubon, ĉu la tuta afero estas io serioza, kvankam konvenas sekvi la regulojn, ĉar, se hazarde iu vere ekzistas.... (Neniu pruvis, ke li ne ekzistas.)

Tio simple signifas, ke mi estas ateisto, ĉar mi mem konvinkiĝis pri tio, sed mi ne estas fundamentisma ateisto, en la senco, ke mi ne pretas kvereli kun religiuloj por nepre konvinki ilin. Kiam la temo leviĝas, mi prezentas mian opinion, sed ĉiam donas al la kontraŭulo la eblecon "savi sian vizaĝon" kaj mi pretas agnoski, ke tra la jarmiloj religioj estis potencaj iloj por plibonigi la mondon, kvankam nun indas konservi la valorojn (ne mortigu, ne ŝtelu, amu vian proksimulon, ktp.) sed forgesi pri la fabeloj.

Mia vera problemo estas trovi manieron semi dubojn pri la "fabeloj" en la mensoj de la fundamentistoj. Ĉu iuj el la legantoj de ATEO scias kiel fari tion? La usonanoj kaj la aliaj okcidentanoj en Afganujo dum dudek jaroj ne sukcesis konvinki iun ajn, pri tio ke Alaho ne estas la plej granda kaj ke la okcidenta civilizo estas preferinda. La rusoj provis antaŭe perforte fari tion, sed ankaŭ ilia metodo, kiel pruvas la historio de la ekssovetaj centraziaj landoj, ne vere konvinkas kaj tuj kiam la perforto ĉesas, Alaho revenas.

Sed, se ni ne povas sukcesi konvinki la religiulojn forlasi siajn fabelojn, ni devos nur atendi, ke la riĉiĝo de la tuta mondo kaŭzos la forlason de religiaj praktikoj, kiel okazas nuntempe en ekonomie evoluintaj landoj. Do, niaj argumentoj ne efikas malgraŭ sia ĝusteco kaj aliflanke, se la tuta mondo riĉiĝos, la planedo ne povos elteni tiun nivelon de konsumado kaj finiĝos pli frue.

## Valentin Melnikov (Rusio)

Mi tute ne kaŝas mian ateisman mondkoncepton. Certe mi ne distrumpetas ĝin trude – ne pro estimo al ies religiaj sentoj, sed ĉar mi opinias ĉian trudon misago, donanta malan efikon: la publiko negative rilatas, kiam iu elstarigas sian mondkoncepton ajnpretekste (tio rilatas al ĉiuj minoritatoj: esperantistoj, vegetaranoj, gejoj ktp.)

Oni konas min kiel homon saĝan (almenaŭ, ordinaruloj vidis miajn sukcesojn en intelektaj ludoj televide), do iam demandas kaj aŭskultas mian opinion pri tio aŭ io alia. En ajna pridiskuto mi defendas la natursciencan mondkoncepton, klarigas eventojn per fizikaj leĝoj. Mi ne okupiĝas pri "politika korekteco", do ne cedas se mi sentas min prava. Mi trankvile kaj firme diras: "dio" ne ekzistas, ĉar tio kontraŭas leĝojn de naturo, pruvitajn faktojn kaj logikon.

Al religiuloj mi rilatas kiel al homoj mense malsanaj. Se la homo kvietas, ne agresemas, oni povas interparoli pri neŭtralaj temoj, sed plejparte tiaj homoj estas simple neinteresaj por mi pro siaj limigitaj mensoj. Kun ili eblas iel kunlabori por iu afero, sed ne amiki. Se iu emfazas sian religiecon, mi nepre evitos plu havi kontaktojn kun tiu homo, same kiel kun infekta malsanulo aŭ kun alkoholulo. Simpla singardo...

Mia ŝatata poeto en Esperanto estas William Auld, kiu verkis plurajn arde ateismajn poemojn. Mi mem iam verkis la jenan poemon – inspiritan de transformiĝo de eks-amiko mia:

### Ortodoksulo: skizo de portreto

Per deca viv' ekzemplon
li montras al popolo:
la vojon en la templon
indikas "dia volo".
Lin duboj ne torturas –
la kred' animon savas.
La konscienco puras.
(Ĉu vere li ĝin havas?)
Neniun malamikas,
sentante la fieron,
kaj pie li predikas,
ke trovis jam la "veron".
Lin regas toleremo
laŭ la ordon' de Kristo:
ĉe ajna vivproblemo
li cedas sen rezisto.
Kvietas kaj trankvilas
sen pensi pri realo...
Perfekte li similas
bovinon en la stalo.

## Dirk Bindmann (Germanio)

Mi estas ateisto. Ĉar mi vivas en orienta Germanio, regiono, kie ateisteco estas normala, mi ne devas kaŝi la mian, nek sendemande mencii ĝin. Antaŭ la pandemio mi regule kunvenis kun aktivuloj katolikaj, protestantaj kaj judaj. Dum tiaj renkontiĝoj mi rolis kiel reprezentanto de ateismo. Do, mi tute ne timas prezenti publike mian ateistecon. Ĝenerale, mi ne provas persvadi religiulojn pri ateismo. Tion mi opinias vana, ĉar religio laŭ mia konvinko malofte estas afero racia, sed afero kultura. Homoj kreskas en kulturoj, kaj ilia kulturo estas ilia hejmo. Ĉiu havu la rajton je sia hejmo. Tamen, en specialaj okazoj mi argumentas por ateismo, se temas pri defendo de homaj rajtoj kaj pri ŝtataj diskriminacioj kontraŭ ateistoj.

## Pino Lalli (Italio)

Ekde kiam mi estis dekunujaraĝa, mi emis manifesti al aliaj mian pensadon pri religio kaj ligitaj kondutoj en la ordinara vivo, kiel la kutimo krucosigni diversokaze. Venko en katekisma konkuro en 1950, pro kio mi estis akompanata al Romo por viziti kvar bazilikojn, kaj ankaŭ la Sanktan Patron Pio XII, okaze de la jubileo, konsciigis min pri la supraĵeco de la katolika religio kaj nekongruo inter tio, kio estas teorie predikata kaj la ekstera realo, kvankam grandioza el arta vidpunkto.

Dum miaj laborjaroj ĉe la Ministerio pri Poŝto kaj Telegrafo ĉiam mi prizorgis la liberigadon de la ejoj je krucifiksoj alkroĉitaj al la muro, kio ĉagrenis iun kolegon. Kelkaj avertis min pri la ebleco de denuncoj fare de la klientaro, sed bonŝance neniu tiom aŭdacis. Vere mia publiko estis ĉiam servita kun la plej granda disponeblo, iafoje eĉ kontraŭ ne plu aktualaj reglamentaj normoj.

Asignite antaŭ tribunalon pro prezento de falsa mono kaj invitite ĵuri sur Biblio, nepre mi rifuzis, min deklarante ateisto. La juĝisto memorigis al mi, ke en aliaj tempoj mi estus kondamnita al brulado. En urbeto en la regiono Abruco la ĉefa Karabenisto *[Temas pri la "Carabinieri", nacia polico videbla ĉie en Italio – Red.]* plurfoje invitis min ne tro evidentigi miajn kontraŭreligiajn inklinojn; li estus devigata skribi tion en siaj sekretaj raportoj. Kaj tamen, en la sama urbeto, la parokestro fariĝis mia amiko, kaj malkaŝis al mi sekretojn, kiuj lin montris ateista kiel mi: en sia dormoĉambro, sur la litkapo, li ne havis sanktan bildon, sed foton de sia patrino.

Sur hospitala lito, kun bela krucifikso pendanta ĉe la muro antaŭ mi, mi plendis al la kuracisto kaj petis, ke tiu religia simbolo estu forprenita, pro respekto al ĉiuj kredsistemoj, inkluzive de ateismo.

En miaj lastaj voloj mi esprimos la deziron havi funebran ceremonion nepre sekularan, kun absoluta foresto de iu ajn religia simbolo.

## Hans Delnat (Belgio)

Pro la fakto, ke en Belgio ne ekzistas veraj problemoj rilate al religiemo aŭ ateismo, mi ne hezitas diri, ke mi estas nekredanto se iu demandas min aŭ se interparolo tuŝas tiun temon. Sed mi ne aktive diskonigas mian ateismon. Volonte mi subtenas movadojn, kiuj okupiĝas pri tio. Tamen se hazarde mi legas artikolon en la gazetaro, kiu ne plaĉas al mi, mi ne hezitas reagi kaj konigi mian opinion tiurilate.

En la flandra ĵurnalo *De Morgen* de la 4a de decembro 2020 aperis la artikolo "Ĉu Sankta Nikolao ne diras, ke mensogi estas aĉa?" Temas pri tio, ĉu vi, kiel gepatroj, mensogante al viaj infanoj pri la ekzisto de Sankta Nikolao, Patro Kristnasko aŭ la dentofeino, tiamaniere instruos ilin mensogi. Eble fido je gepatroj ankaŭ suferos pro tio. Fakte, temas pri mensogoj kaj pri granda komploto inter la plenkreskuloj, kiuj trompas la infanojn kun la plej bona intenco. Tio kondukis min al la sekva elpensaĵo, kiun mi sendis al la gazeto kiel legantleteron:

"Persone mi konsideras la mensogojn kiel aron da fabeloj, kiuj ĝuigas kaj la infanojn kaj la plenkreskulojn. Post kiam infanoj, kiuj travidas la ludon ekscias pri la vero, ili tuj feliĉas kunludi en la trompado. Se tiuj malgrandaj 'mensogetoj' havus tiel grandegan efikon, mi demandas min, kio estas la rezulto de la plej granda mensogo kaj komploto de ĉiuj tempoj. Temas pri mensogo, kiu iam estis uzata en Eŭropo por forigi alikredantojn per bruligado, viva entombigo kaj similaj kruelaĵoj. Ankaŭ ĝi daŭre malamikigas inter si grupojn ene de landoj kaj eĉ tutajn landojn. Katedraloj, moskeoj kaj temploj estis konstruitaj por ĝi. Ĝi ebligas al la eklezia instancoj bone kaj riĉe vivi tiel longe kiel ili povas vivteni la miton. Do ne mirigas, ke homoj tiel facile akceptas ĉiujn hodiaŭajn falsajn novaĵojn. Kia traŭmo atendas tiujn, kiuj finfine vidos, kiel ili trompiĝis dum multaj jaroj?"

Je mia surprizo kaj ĝojo, mia reago aperis en la ĵurnalo la 7an de decembro.

## Russ Williams (Pollando)

Mi ne kaŝas mian ateistecon. Mi ne memoras ajnan okazon, kiam mi hezitis aŭ timis diri, ke mi estas ateisto. Ekde mia infanaĝo (en Usono), ŝajnis al mi tute en ordo kaj normale ne kredi je dio, kaj mi ĉiam konis multajn aliajn ateistojn, kvankam mi ankaŭ konis multajn kredantojn kaj eĉ iradis al religia lernejo dum pluraj jaroj. (Miaj gepatroj elektis ĝin pro la kvalito de la instruistoj, ne pro la deviga semajna diservo.) Kaj plejmultaj miaj religiaj konatoj ĉiam estis progresemaj kaj toleremaj kaj malferm-mensaj, ne konservativaj kaj juĝemaj. Do por mi ateismo, simile al Esperanto, veganismo, ludoj, libroj, muziko, ktp, estas simple unu aspekto de mi, neniel kaŝenda.

Sed mi scias, ke ne ĉiuj havas tian bonŝancon. Mi kreskis en ne-religia

familio, kaj miaj gepatroj klare esprimis, ke nenio misas pri ateismo, do mi neniam sentis ian honton pri mia nekredo je dio. Antaŭ longa tempo, ateista amiko rakontis al mi, ke liaj gepatroj estas fanatike religiaj, kaj li do ŝajnigas al ili ke kompreneble li estas kredanto, ĉar li scias, ke estus granda konflikto se ili ekscius, ke li estas ateisto. Tia timo estis surpriza kaj sufiĉe fremda por mi. Mi ĉiam konstatis abstrakte, ke estas diskriminacio kaj antaŭjuĝoj kontraŭ ateistoj; ekzemple en Usono opinisondoj montras, ke ateisto neniel povus elektiĝi al altranga politika posteno kiel prezidento. Sed en mia persona ĉiutaga vivo, ateismo ne estis problemo, do la rakonto de mia amiko pli konstatigis min pri la personaj problemoj, kiujn rekte suferas iuj ateistoj pro familia premo kaj konformema religia socia rondo. Mi bonŝance ĉiam loĝis en urboj kaj laboris en medioj, kie ateismo simple ne gravis kaj ne kaŭzis problemon en la ĉiutaga vivo, kiam la temo fojfoje aperis.

Nun mi loĝas en Pollando, pli unureligia lando ol Usono. Same kiel en Usono, mia propra ĉiutaga vivo ne prezentas problemojn pri ateismo, sed mi loĝas en unu el la plej progresemaj polaj urboj, kaj mi ne multe sociumas kun forte konservativaj religiuloj, do ateismo simple ne gravas kaj ne surprizas; se mi loĝus en ia konservativa katolika vilaĝo, mi eble pli zorgus pri la reagoj de homoj.

## Aleksandro Ĥoroŝilov (Rusio)

Mi ordinare pli aŭskultas ol parolas. Verŝajne, mi eĉ povas diri, ke mi estas silentemulo. Mi ne havas mian rondon. Tial ne povas temi pri diskonigado de mia ateisteco. Estas unu konato kun kiu ekzistis komuna intereso pri tekniko, sed mi ne vidas lin nun. Krome mi eterne malsanas.

Tamen, mi ne dirus, ke mi forte kaŝas mian malkredon je dio. Estis okazoj kiam mi devis defendi mian sendiecon. En 2017 mi kuŝis en malsanulejo kaj estis deprimita pro akutiĝo de daŭra malsano. Piulino konatiĝis kun mi. Ŝi sugestis, ke estas envulto sur mi, kaj proponis, ke mi senigu min je tio, t.e. ŝi konas iun, kiu povas helpi. Mi nur aŭskultis kaj rimarkis, ke ŝi diris, ke “la unuan fojon ne necesas pagi”, el kio mi konkludis, ke pli bone ne havi rilatojn kun ŝi. Krome ŝi demandis: ”Kial mi ne portas kruceton?” Mi respondis per silento. Mi havas baptopatrinon, sed neniam portis la kruceton. Post mia restado en la malsanulejo, ŝi telefonis al mi, sed mi respondis, ke malbone aŭdeblas. Kaj ŝi, kompreninte fine, ke mi ne volas havi kun ŝi rilatojn, malaperis. (Estas abomene, ke tiu piulino iam studis en la sovetaj jaroj kaj nun estas kredantino. Multaj homoj subiĝis al eklezia premado en la lando.)

En 2014 ne malproksime de mia hejmo, mi renkontis du piulinojn. Kelkajn tagojn antaŭe, preterpasante ilin de malantaŭe, mi kaptis ilian interparolon pri religiaĵoj kaj tial sciis, ke eble ili

apartenas al iu sekto. Tial, kiam ili ekprovis enmanigi al mi iun broŝuron, mi interrompis ilin kaj diris kun kolero: “Malaperu! Por ke mi ĉi tie ne vidu vin plu!” Tio bone funkciis. Ili estis timigitaj kaj post tio mi ne plu renkontis ilin surstrate.

Mi aldonos, ke estas maltrankvilo ĉe mi. Kiam mortos mia patrino mi preferus ne observi tradiciojn, laŭ kiuj kiam mortinto kuŝas oni invitas popon, kiu staras kaj parolas kaj homoj staras kaj aŭskultas, kaj poste al la popo necesas pagi. Kaj antaŭ ikono devas bruli olea lucerno. Mi ne scias kiel mi kondutos. Estas parencoj, kiuj verŝajne premos min…

Ĝenerale mi ne certas, se en Rusio eblas diskonigi ateistecon kaj resti libera.




## Jean-Claude Roy (Francio)

Mi tute ne estas aktivulo aŭ zeloto pri mia ateisteco. Mi estas multe pli apostolo kaj propagandisto pri mia esperantisteco. Pri lingvo estas facile! Paroli kaj skribi sufiĉas.

Pri ateismo, ne estas skribite sur mia frunto aŭ en mia Facebook-konto, ke mi estas ateisto. Sed multaj kredantoj facilanime montras sian kredon en Facebook. Kiam kredanto en Facebook tro ofte kaj plumpe trudas sian religion, mi indikas, ke tiu ĉesu kaj formetu min el sia listo de personoj al kiuj ili sendas evangeliojn aŭ aliajn onidire sanktajn tekstojn. Mi baris kelkajn zelotojn kaj nuligis nian “amikecon”. Kiam komenciĝas diskutoj kun religiaj temoj, mi ne hezitas kontraŭstari kaj indiki, ke mi tute ne kredas. Tio ne ĝenas min, sed ofte la kredantojn.

Tamen, kelkaj el miaj amikoj en nia movado kredas je ia dio kaj mi respektas iliajn kredojn. Pri iu, kun kiu mi havas multajn amikajn rilatojn kun interŝanĝoj de bildkartoj kaj partopreno en diversaj projektoj, mi scias, ke ŝi kredas je dio kaj ŝi scias, ke mi tute ne kredas. Tio ne baras nian amikecon. Pri iu alia, mi scias, ke ŝi kredas sed mi neniam parolis al ŝi pri mia ateisteco. Diskuto pri kredo aŭ ateismo ne alvenis en niaj mesaĝoj. Miaopinie ne gravas. Kaj ŝi ne starigis la demandon. Kaj estas aliaj amikoj, kiuj kredas (mi sentas tion) sed tute ne parolas pri tio. Okazis en nia loka klubo, ke ni kelkfoje diskutis pri diversaj kredoj kaj ni malferme indikis kiu kredas aŭ ne. Konsternite mi konstatis,

ke pli ol duono de la klubanoj kredas diversajn fabelojn. Ekzemple, multaj kredas je sia propra protekta anĝelo kaj eĉ diskutas kun sia anĝelo. Ne malmulte kredas je la sanigpovo de Bruno Gröning. Tiu guruo mortis en 1959 sed ili certas, ke li daŭre resanigas!! Memoru la Universalan Kongreson en Lillo, kie ties adeptoj prelegis plurfoje kaj havis budon tuj malantaŭ la akceptejo! Kelkaj klubanoj renkontiĝas kun aliaj adeptoj kaj havas kunvenojn ĉiusemajne. Ili estas tiom fervoraj adeptoj, ke ili eĉ vojaĝas al la tombo de la guruo por profiti liajn bonefikojn.

Do, mi ne malferme montras mian ateismon sed mi ne kaŝas ĝin. Se iu demandus min, mi malferme indikus kaj klarigus. Ateismo ne estas kiel naturismo! Sed mi pensas, ke mi havas la saman sintenon rilate tiujn du aspektojn de mia vivo. Mi malferme povas paroli pri mia ateisteco same kiel pri mia praktiko de naturismo.

## Franciska Toubale (Aŭstralio)

Dum miaj dudek sep jaroj da vivo en Aŭstralio, nur du fojojn mi devis konigi ĉu mi estas dikredanto aŭ religiano, ĉu ne. Tio estis kiam mi enhospitaliĝis kaj kiam mi fariĝis aŭstralia civitano.

La kandidatoj por aŭstralia civitaneco estas dividitaj en du grupojn dum la ceremonio: la dikredantoj promesas, sub Dio, lojalecon al Aŭstralio kaj ties loĝantoj ktp kaj ricevas ekzempleron de la Biblio - mi ne scias kiun version de la Biblio ili ricevas aŭ ĉu eblas elekti inter diversaj versioj; la nedikredantoj faras la saman promeson, sed sen la mencio de dio kaj ricevas ekzempleron de la konstitucio. Tiu ceremonio spegulas la neklarecon de la leĝoj rilate al religio.

Laŭ sekcio 116 de la konstitucio: “La ‘Commonwealth’ ne rajtas fari leĝojn por establi iun ajn religion aŭ trudi observadon de iu ajn religio aŭ malpermesi liberan praktikadon de iu ajn religio kaj neniu religia testo estas postulata kiel kvalifiko cele iun ajn oficon aŭ publikan fidon kadre de la ‘Commonwealth’”. Aŭstralio konsideras sin sekulara lando kun laŭleĝa apartigo de la ŝtato disde la religio kaj kun neniu ŝtata religio. Tamen en la antaŭparolo de la konstitucio estas menciita Dio ĉiopova. 13,5 milionoj da aŭstralianoj identigas sin kiel religiaj kaj 7,1 milionoj nereligiaj.

La ĉefministroj ne kaŝas de kiuj religioj ili estas membroj. Por mencii nur tiujn, kiuj regis ekde mia alveno, Paul Keating, John Howard, Kevin Rudd kaj Tony Abbot estas kristanoj dum Julia Gillard estas ateisto. La nuna ĉefministro Scott Morrison estas evangeliisma kristano. Al la voĉdonantoj gravas tiu informo. Sed neniu interesiĝas pri la kredsistemo de ordinaraj homoj. Fakte, la eklezioj perdis multe da siaj praktikantoj, kaj tial agadoj kiel sporto, dancado kaj muzikumado ofte okazas en religiaj haloj. La lu-mono helpas la ekleziojn sin vivteni.

Mi tre ĝojas pri la sento de libereco, kiun mi spertas en Aŭstralio, sed mi konscias ke se mi surportus signon de aparteno al religio kiel la islama, pro la okazaĵoj en la mondo, mia sperto estus alia.

# Ĉielo, infero?

*Jakvo Schram (Belgio)*

Mia filino naskiĝas kaj evidente mi diras tion al mia kolegoj. Gratuloj venas kaj samtempe la demando: kial ŝi ne estas baptita? Mi respondas: "Baptita? Sed vi scias, ke mi ne kredas je ajna dio, do kial mi devas baptigi ŝin?"

"Ŝi iros al la infero – ĉu vi ne scias tion?" diras la kolego, kiu sidas malantaŭ mi.

"Ĉu vi pretas akcepti tiun respondecon?"

Mi devas ridi, kaj mi diras: "Se oni ne kredas, oni ne baptas siajn infanojn."

"Sed imagu, kio okazus, se ŝi mortus post kelkaj tagoj," diras alia kolego.

"Mi certe ne devas danki iun dion pro tio," estas mia respondo.

En tiu momento la estro envenas kaj estas denove plena silento.

Kelkajn jarojn poste mi partoprenas la skotan kongreson en Edinburgo. Dum promenado mi vizitas kun kelkaj esperantistaj geamikoj la skotan parlamenton. Tio estas ege interesa, kaj poste ni ĉiuj soifas por granda glaso da biero. Kelkaj el ni iras al la trinkejo kun iu homo, kiun mi ne konas. Enirante la trinkejon mi diras: "Ho mia dio, kiom da bruo estas ĉi tie." La nekonato diras al mi: "Ne uzu la nomon de la Sinjoro en via parolo." Li diras tion laŭ tre fanatika maniero, sed mi nur respondas: "Kial ne?" La nekonato komencas klarigi, sed



*La preĝejo de Sint Joris (Sankta Georgo), Antverpeno, Belgio*

kiam li finas mi respondas: “Mi ne kredas je Dio aŭ Alaho aŭ kiel ajn vi deziras nomi lin.” La nekonato diras, ke li estas vere kaj ekstreme ŝokita, kaj forlasas nin.

Mi respektas ĉiujn homojn, ĉiujn kredojn, sed mi volas, ke ili respektu min. Se la homoj volas rigardi tiun, kiu staras antaŭ la kredantoj kaj diras siajn mensogojn, ili rajtas fari tion. Oni diras: “Je Dio ni kredas” aŭ “Dio savu nian landon”, sed kiam oni iras al milito por mortigi nekonatajn personojn, oni ne rajtas paroli pri Dio.

La pasintan semajnon mi estis en la preĝejo Sint Joris (Sankta Georgo) en Antverpeno. Ĝi estas bela preĝejo. Mi estas certa, ke la pastroj donacis multe al la enmigrintoj, kiuj venis ĉe ni — mi volis diri al nia lando. Tamen lando ne estas “nia” aŭ “via”, ĉar lando ne apartenas nur al iuj personoj. Ĝi estas komuna havaĵo.

# Nekredemo jam ekde lernejaj jaroj

*Hans Delnat (Belgio)*

*Kiam mi relegis mian tekston pri diskonigado de mia ateismo [en paĝo 8 de tiu ĉi numero - Red.], spontanee aperis la demando: “Kiel eblas ke mi estis tiel nekredema dum mia tuta vivo?”*

Mi imagas, ke kiam mi estis baptita kiel romkatoliko en mia tria vivtago, mi laŭte protestis. Mi ne eraris, ĉar mi estis baptita sub la malĝusta sanktulo! Nomite Hans mi devus baptiĝi sub Sankta Johano, sed la pastro opiniis, ke ankaŭ Hubertus komenciĝas per H, do uzis ĝin. Eble aŭdiĝis alarmo en tiu momento, ĉar estis en plena milittempo.

Kiel infaneto mi estis sendita al protestanta lernejo, kie oni rakontis al ni ĉiajn belajn rakontojn el la Malnova Testamento. Ekde la unua klaso kaj en la dimanĉa matena lernejo, tiuj rakontoj pli kaj pli temis pri trompo, ŝtelo, murdo kaj mortigo sub kruela dio, kiu eĉ postulis homoferojn. Aliflanke, estis tiu sama novtestamenta dio, kiu predikis amon. Li havis filon, kiu realigis miraklojn sur ĉi tero kiel kutimas en fabeloj. Ĉiu rakonto eĉ pli neverŝajna ol alia.

Mi demandis mian patrinon ĉu mi povas ŝanĝi la lernejon kaj tion ŝi permesis ekde la dua lernojaro. De kiam mi estis ok-naŭ-jara, mi estis sendita al infanferiejo en aŭgusto. Verŝajne la gvidantaro supozis, ke ĉiuj infanoj tie estas katolikaj kaj mi devis iri al preĝejo kun la grupo la 15-an de aŭgusto, Ĉieliro de la Virgulino Maria. Verŝajne estis tre frumatena meso, ĉar mi ankoraŭ povas vidi min iranta laŭ pado al preĝejo ĉe tagiĝo. Estis ankoraŭ mallume interne kaj mi vidis kun miro kio okazas tie: ni devis ripete leviĝi, turni niajn seĝojn, surgenuiĝi, leviĝi ktp. En la antaŭo kandeloj estis lumigitaj, sonoriloj tintis kaj fumvualo

leviĝis. Krome, estis murmuroj kaj paroloj en nekomprenebla lingvo. La gvidantoj verŝajne rimarkis mian konfuzon pri la disvolviĝo de la meso. Pro tio, mi en sekvaj dimanĉoj rajtis pludormi, dum la aliaj infanoj devis leviĝi el siaj varmaj litoj. Posttagmeze la procesio eliris, homoj surgenuiĝis laŭ la vojo dum kelkaj statuoj estis portataj. Ĉu en la protestanta dimanĉa lernejo oni ne rakontis al mi, ke bildoj estas pekaj?

Ekde la kvara lernojaro, mi estis la sola lernanto, kiu sekvis protestantan religion. Sekve la pastoro instruis al mi kvazaŭ private. Dum tiuj lecionoj okazis pli da diskutoj pri la Biblio ol estis la intenco de la lecionoj. La ideo, ke Dio ĉiam estis kaj ĉiam estos, ŝajnis al mi ridinda. Ĉu li kreis sin mem, el kio kaj kiel? La diskutoj finiĝis, kiam la pastoro venis al la domo de mia patrino kaj diris: "Tiu knabo neniam kredos."

Poste, en la mezlernejo, ne eblis trovi protestantan religiinstruiston liberan por instrui nur al unu studento kaj do mi estis ĉiufoje libera dum unu horo kaj foje eĉ povis iri hejmen pli frue. Do mi eksciis, ke ne havi religion signifas grandan gajnon de tempo kaj libereco!

En la lecionoj pri historio ni lernis pri la egiptoj, la grekoj kaj la romianoj, kiuj ĉiuj havis siajn proprajn diojn kun tuta mitologio ligita al ili. Kiam mi pensas, ke ĉiuj tiuj homoj kredis je ili, oferis por ili kaj konstruis templojn, kaj kiel ili nun estas konsiderataj kaj malakceptataj kiel "superstiĉo", mi demandas min kial tio ne malfermas la okulojn de la homoj.

Tiu dio, en kiu oni nun tiel firme kredas, estis inventita antaŭ ĉirkaŭ 4000 jaroj. Dum 2000 jaroj la rakonto estis adaptita kaj tiam alvenis viro, kiu deklaris sin filo de Dio kaj tute alproprigis la rakonton al si. Liaj samtempuloj ne tiom ĝojis pri tio kaj preferis liberigi murdiston anstataŭ tiun homon. Ĉar li mortis sur la kruco, tuta kulto ekestis kun rakontoj poluritaj de centoj da jaroj. Ĝi alportis monon kaj potencon, do aperis pli kaj pli malsamaj fluoj, ĉiuj irante laŭ sia vojo.

Surprize restas al mi, ke en ĉi tiu epoko de scienco kaj racio ekzistas ankoraŭ tiom da homoj, kiuj ne kuraĝas ekkompreni, ke la ankaŭ nunaj religioj estos la "superstiĉoj" de la estonteco.




*(Kunaŭtoro: Marian Zdankowski)*

# HISTORIAJ PERSPEKTIVOJ

## La liberpensa mezepoka imperiestro

*Nyegosh Dube (Pollando)*



*Frederiko II renkontiĝas kun Sultano Al-Kamil en Jerusalemo (G. Villani, 14a jc)*

Mezepoka Eŭropo – profunde religia, regata de dogmeca, severa, netolerema katolikismo, kun persekutado de diversaj alikredantoj, krucmilitanta kontraŭ islamanoj, paganoj kaj herezaj kristanoj. Tio estas la imago, kiun ni havas de tiu epoko, kaj verŝajne plejparte ĝi estas prava. Tamen, unu el la plej grandiozaj eŭropaj imperiestroj de la Mezepoko, naskita katolika, montris grandan toleremon kaj interesiĝon rilate al aliaj religioj kaj iliaj anoj, havis sciencan aliron al la mondo, subtenis sekularismon kaj batalis kontraŭ teokratio, transformis krucmiliton en pacan entreprenon, kaj sekve havis grandan konflikton kun papoj, kiuj ekskomunikis lin trifoje kaj akuzis lin pri herezo.

Frederiko II (1194-1250) estis la Reĝo de Sicilio, regno kiu ampleksis tiun insulon kaj ĉefteran sudan Italion. Sed krome, li estis la Reĝo de Italio kaj de Germanio, kaj plej grave la "Sankta Roma Imperiestro". La Sankta Roma Imperio estis stranga politika estaĵo – efektive malcentrigita konfederacio, kiu etendiĝis de centra Italio, tra la nuna Svislando, ĝis la Norda kaj Balta maroj, ampleksante partojn de Francio, kaj la tutajn Bohemion (la nunan Ĉeĥion), Nederlandon kaj Germanion, kiu tiam konsistis el dekoj da ŝtatetoj. Frederiko rekte regis Sicilion kaj nerekte la imperion.




*La Reĝlando de Sicilio dum la regno de Frederiko II*

Sicilio havas interesan historion. En antikveco, ĝi havis grekajn koloniojn, poste fariĝis roma provinco, sekve parto de la Bizanca Imperio, poste islama emirlando. La ĉirkaŭ-200-jara islama periodo venis al fino pro invado de normandoj ekde 1060, kelkajn jarojn antaŭ la Normanda Konkero de Anglio. Roĝero II, la filo de Roĝero I (kiu estris la invadon), estis brila reĝo kun kosmopolita, intelekta kortego. Fakte multaj islamanoj restis en Sicilio. Okazis kunfandiĝo de kulturoj – greka, araba, normanda, latina-itala, kaj ankaŭ juda. Sub Roĝero II prosperis scienco, filozofio, poezio, arto, arkitekturo, kaj la insulo mem. Palermo fariĝis unu el la plej grandiozaj kaj multekulturaj ĉefurboj en Eŭropo.

En tia medio kreskis kaj edukiĝis en Palermo la nepo de Roĝero II. Ĉirkaŭataj de kleraj homoj el diversaj kulturoj kaj religioj, Frederiko II lernis plurajn lingvojn, inkluzive de la araba, kaj estis edukita pri ĉiuj el la abrahamidaj religioj rekte de iliaj anoj. Ankaŭ de maristoj kaj komercistoj li aŭdis rakontojn pri aliaj landoj kaj kulturoj. Nur 4-jara, li formale fariĝis Reĝo de Sicilio, sed efektive kiam li estis 14-jara. Kun li komenciĝis la periodo de regado de la Ŝtaŭfoj (germane *Hohenstaufen*), germana

dinastio. Tamen patrinflanke li estis normando kaj grandparte lia regno estis daŭrigo de la normanda epoko, kun multaj similecoj al tiu de Roĝero II. En 1212 Frederiko fariĝis ankaŭ Reĝo de Italio kaj Reĝo de Germanio, kaj en 1220, li fariĝis, kiel antaŭe lia patro (Henriko VI), Sankta Roma Imperiestro. Impona kariero!

Kiel la kortego de Roĝero, tiu de Frederiko estis brila, plena je intelektaj agadoj kaj atingoj. Li allogis kaj patronis sciencistojn, matematikistojn, filozofojn, juristojn, artistojn kaj poetojn – de diversaj naciecoj kaj religioj. Interalie ili tradukis gravajn arabajn kaj grekajn verkojn en la latinan, ekzemple komentaron de Averroes (raciisma islamano) pri Aristotelo. La itala matematikisto Fibonacci, kiu enkondukis hind-arabajn numerojn al Eŭropo, vizitis la kortegon kelkfoje. Ankaŭ menciindas, ke moderna itala literaturo naskiĝis ĉe lia kortego kiel la Sicilia Skolo de poezio, kiu influis Dante kaj aliajn – fakte la soneto, grava poezia formo uzata de Ŝekspiro, estis inventaĵo de la skolo. Frederiko mem verkis poemojn kaj sciencan traktaĵon pri ornitologio.

La imperiestro estis viro kun grandaj scivolemo kaj intelekta energio, kaj forta deziro antaŭenigi sciojn pri la mondo kaj la universo kaj ankaŭ arton kaj literaturon; ĝuste tial li arigis ĉirkaŭ si tiun ĉi klerularon. Li kaj liaj korteganoj korespondis kun aliaj kleruloj tra Italio kaj la islama mondo, kies religio,



*La ĉefa konstruaĵo de la Universitato de Napolo Frederiko II (Wikimedia)*

kulturo kaj intelekta-scienca agado ege interesis Frederikon. Aparte interesaj estas la demandaroj, kiujn li dissendis – al siaj propraj kleruloj kaj al arabaj – kun multaj demandoj pri la tero, la kosmo, la ekzisto de “aliaj ĉieloj” kaj iliaj loĝantoj, la eterneco de la universo, la animo kaj ĝia senmorteco, la situo de paradizo, purgatorio kaj infero, kaj la situo de Dio. Estas rimarkinde, ke por li demandoj pri Dio, paradizo kaj infero estis sciencaj aferoj kaj li sendis ilin ne al teologoj, sed al scienculoj! La demandoj gajnis por li respekton inter la araba klerularo, sed suspektemon inter katolikaj kleruloj kaj eklezianoj en Italio, kiuj rigardis lin kiel Epikuranon kaj ankaŭ kiel tro proksiman al islamanoj.

La sekulara sinteno de Frederiko estis videbla ne nur rilate al la ĉi-supre priskribitaj intelektaj agadoj, sed ankaŭ en la politika kaj religia pejzaĝo en kiu la imperiestro agis. La centra elemento de tiu ĉi pejzaĝo certe estis la longedaŭra konflikto inter la imperiestro kaj la papoj, kiuj oficis dum lia longa regno. En tiu epoko, papoj estis ne nur la estroj de la katolika eklezio, sed ankaŭ politikaj agantoj, kun granda teritorio en centra Italio, kiuj provis subigi al si laikajn regantojn en Eŭropo. Frederiko malakceptis tion – li kontraŭis teokration. Je lia kronado kiel imperiestro en 1220, li ĵuris krucmilitiri laŭ la volo de la papo, sed preferis prokrasti tiun devon kaj reorganizi sian Sicilian reĝlandon, anstataŭigante la dispecigitan regadon de diversaj lokaj eklezianoj kaj feŭdaj potenculoj per efika, centrigita regado. Tiu plifirmigo de reĝa potenco ne tro plaĉis al la Papo, kiun ĉagrenis la perdo de teritorioj kaj influo.

Rilate al tiu firmigo de lia potenco en Sicilio, menciindas du gravaj atingoj de la imperiestro, kiuj estis grandaj paŝoj antaŭen laŭ sekularisma vojo. En 1224 li fondis la unuan sekularan ŝtatan universitaton en Eŭropo en Napolo, kiu hodiaŭ portas lian nomon. Ĝiaj celoj estis krei kadron de profesiuloj por administri la ŝtaton kaj ankaŭ ĝenerale disponigi al liaj regatoj alternativon al norditalaj universitatoj kiel Bolonjo. (Ironie, unu el ĝiaj plej famaj studentoj estis la katolika teologo Tomaso Akvino!) Kaj en 1231, li publikigis la “Konstituciojn de Melfi”, kiuj estis bazita sur raciaj, sekularaj principoj. Ĝi estis ne nur la plej ampleksa leĝaro ekde la Kodo de Justiniano de la 6a jarcento, sed ankaŭ la plej progresinta leĝaro en Eŭropo, pli proksima al la epoko de la Klerismo kaj eĉ al nia tempo ol la Mezepoko.

El nia vidpunkto, aparte grava elemento de la Melfi-leĝaro estis, ke ĝi plene subigis eklezianojn kaj ekleziajn aferojn al la Krono kaj la nova ŝtata justec-sistemo, la rezulto de ĝisfunda modernigo de la feŭdeca ordo, kie lokaj potenculoj kaj eklezianoj regis kaj juĝis. Kvankam bedaŭrinde la leĝaro konservis herezon kiel krimon, almenaŭ procesado kontraŭ ĝi nun estis pure ŝtata afero. La Konstitucioj interalie starigis la leĝan egalecon de ĉiuj civitanoj, malpliigis la potencon de nobeloj, plifortigis la rajtojn de virinoj, garantiis rapidajn procesojn kaj malpermesis “dian juĝon” (ekz. per fajro-provo), kaj enkondukis leĝojn por protekti la medion kaj konsumantojn



*Statuo de Frederiko II en lia naskiĝurbo Jesi (Giusy Marinelli) / Melfi kun ĝia kastelo, kie la leĝaro estis proklamita (Iurii Buriak)*

– tiuj lastaj anticipis leĝojn de la 20a jarcento! Nesurprize la Papo forte kritikis la Melfi-leĝaron ĉar ĝi minacis la politikan potencon de la eklezio en suda Italio.

Estis gravaj okazaĵoj inter la fondo de la universitato kaj la publikigo de la leĝaro. En 1227, finfine plenumante sian ĵuron, Frederiko ekveturis ŝipare kun armeo direkte al Palestino por fari krucmiliton. Sed pro epidemio, kiu frapis ankaŭ lin, li ordonis revenon al Italio. Tio kolerigis la novan papon Gregorio IX, kiu sekve ekskomunikis lin. Kiam en 1228 la imperiestro denove ekvojaĝis krucmilitcele, la papo koleriĝis ĉar ekskomunikito aŭdacis estri krucmilitiron! Frederiko atingis grandan sukceson tute sen sangoverŝado: anstataŭ militi, li traktis amikece kun la Sultano de Egiptio, kiu tiam regis Palestinon, kaj rezulte reakiris por kristanoj Jerusalemon (krom la Templa Monto), Betlehemon kaj aliajn lokojn por 10 jaroj. Tamen, Gregorio kondamnis tiun ĉi pacan atingon kaj sendis armeon por konkeri Sicilion. Sed Frederiko revenis kaj rebatis la invadon – kaj post intertraktado la Papo forigis la ekskomunikon en 1230.

Dum la 1230-aj jaroj, la imperiestro okupiĝis pri Germanio, kien li iris kelkfoje por ordigi aferojn, kaj pri Norda Italio, kiun li celis meti sub sian rektan regadon. Li ĉiam interesiĝis ĉefe pri Italio, kaj tial lasis Germanion al ĝiaj potencaj princoj. Fakte, li bezonis ilian helpon: ili provizis lin per miloj da kavaliroj, kiuj fariĝis la

kerno de armeo, per kiu li atakis urbojn de la Lombarda Ligo. La Ligo estis formita ĝuste por kontraŭstari la imperiestron. Jam dum jardekoj okazis konflikto inter la por-papaj “Gelfoj” kaj la por-imperiaj “Gibelinoj”. Troviĝis norditalaj urboj en ambaŭ flankoj. La papoj sentis sin minacataj (tute realisme!) de la streboj de Frederiko regi rekte kaj nordan kaj sudan Italion. Do la Ligo kaj la papoj havis la komunan celon haltigi Frederikon. La milito kulminis en imperiestra venko ĉe la Batalo de Cortenuova en 1237 – krom la kavaliroj, lian armeon konsistigis gibelinoj kaj… saracenoj (islamanoj).

Reage al lia nordítala militkampanjo, en 1239 Gregorio denove ekskomunikis Frederikon publikigante longan liston de kontraŭ-ekleziaj ofendoj, kaj aldone akuzis lin pri herezo kaj nomis lin “bestaĉo” kaj “antaŭulo de la Antikristo”. Rebate, la imperiestro ĵetis la kalumniojn reen kaj daŭrigis sian militkampanjon kontraŭ la papaj/gelfaj fortoj. Li kaptis pliajn urbojn, invadis la Papajn Ŝtatojn mem, kaj eĉ kaptis altrangajn eklezianojn francajn kaj italajn ŝipveturantajn al Romo. En 1241 mortis Gregorio kaj en 1243 elektiĝis nova papo Inocento IV. Li havis forte malamikan, malfideman sintenon al la imperiestro. Okazis malfacilaj intertraktadoj inter li kaj Frederiko, kiuj ne tro surprize fiaskis. La papo timis atakon de Frederiko aŭ liaj subtenantoj kaj fuĝis al Liono (Francio), kie li kunvenigis grandan konsilion de episkopoj en 1245. La konsilio ne nur re-ekskomunikis la imperiestron, sed detronigis lin, akuzante lin pri diversaj krimoj, inkluzive de herezo, interalie pro lia “abomena amikeco kun saracenoj”. Frederiko, nomita de siatempaj admirantoj *stupor mundi* (mirindaĵo de la mondo), respondis per letero forte kondamnanta la eklezion kaj daŭre batalis en norda kaj centra Italio, kun sukcesoj kaj malsukcesoj, ĝis sia forpaso en 1250.

# La krizo de la katolika eklezio en Germanio

*Jiri Proskovec (Germanio)*



*Impostoj helpis financi la luksan modernan rezidejon de episkopo (Thomas Frey / dpa)*

Kristanaj eklezioj ĝuas en Germanio privilegian pozicion. La ŝtato ekzemple mem kolektas eklezian imposton. Ĝi ankaŭ organizas kaj financas religian instruadon en ŝtataj lernejoj. Eĉ salajroj de episkopoj estas pagataj de la ŝtato kaj tiel eĉ senkonfesiuloj aŭ anoj de aliaj religioj kiel impostpagantoj vole-nevole kontribuas. Eklezioj posedas diversajn bonfarajn kaj sociajn entreprenojn kiel infanĝardenojn kaj malsanulejojn, sed ilian financadon transprenas preskaŭ entute la ŝtato. Skandale estas, ke la eklezio aplikas en tiaj institucioj siajn proprajn laborleĝojn. Laborantoj tie ekzemple ne rajtas striki aŭ povas esti maldungitaj se ilia vivo ne kongruas kun la eklezia moralo.

La evoluo dum la lasta tempo donas iom da espero. La germana socio, kaj eĉ kelkaj politikistoj komencas pridemandi tiajn privilegiojn kaj la aŭtoritaton de la eklezio. Efektive kaj la protestanta kaj la katolika eklezio

perdas ekde pluraj jaroj membrojn, sed la perdo estis ĉe protestantoj pli grandskala ol ĉe katolikoj. Tio servis al konservativaj katolikoj kiel argumento kontraŭ reformoj, ĉar la protestanta eklezio estas tradicie pli liberala kaj reformema. Tamen, nun troviĝas la germana katolika eklezio en granda krizo; kelkaj eĉ diras, ke temas pri la plej granda krizo en ĝia historio. Kiel tio okazis?

Unuflanke kreskas la kontrasto inter la pli kaj pli liberala moralo de germanaj katolikoj koncerne ekzemple divorcon, samseksamon kaj la rolon de virinoj ene de la eklezio kaj la rigida moralo propagata de la eklezio. Aliflanke pluraj skandaloj ene de la katolika eklezio malkaŝis ĝian duoblan moralon kaj hipokritecon kaj ŝokis eĉ la plej fidelajn katolikojn.

En 2013 aperis la unuaj informoj pri episkopo Van Elst en la urbo Limburg. Montriĝis, ke li konstruigis por si luksan rezidejon por pli ol 30 milionoj da eŭroj. Baldaŭ oni parolis nur pri pretendema episkopo kaj multaj katolikoj demandis sin, ĉu por tio oni pagas la eklezian imposton. Van Elst fine eksiĝis de sia posteno, sed multaj katolikoj forlasis la eklezion post tiu skandalo. La katolika eklezio ĉi-kaze parolis pri miskonduto de unuopulo. Tamen, la fakto, ke la germanaj episkopejoj posedas havaĵojn valorantajn 21 miliardojn (!) da eŭroj estas nerefutebla.

Nenio skuis la katolikan eklezion pli ol la skandalo pri seksa misuzo de infanoj kaj junuloj. En 2010 aperis unuaj raportoj pri seksa misuzo en pluraj katolikaj lernejoj en Germanio. Pli kaj pli da kazoj koniĝis. La eklezio ne plu povis nei, ke ĝi havas problemon. Inter 1946 kaj 2014 oni kalkulis pli ol 3600 kazojn. Kiom da kazoj restas nekonataj, pri tio eblas nur diveni. Tamen, tiuj, kiuj esperis, ke okazos profunda esploro baldaŭ seniluziiĝis. La eklezio ĝis nun malhelpas sendependan esploron kaj traktas la aferon kiel sian internan problemon. Germanaj episkopoj ofte rifuzas publikigi trafajn dokumentojn por protekti krimintojn. Kaj kion faras la germana ŝtato? Nenion! Ĝi kontentiĝas per tio, ke la eklezio mem esploras la kazojn. Imagu, ke oni lasus la italan mafion mem esplori siajn krimojn. Oni parolas pri paralela eklezia justeco protektanta krimintojn. Ekzempla estas la kazo de Kolonja episkopo Rainer Maria Woelki. Li farigis studon pri seksa misuzo en la Kolonja episkopejo, sed rifuzis ĝin publikigi, unue argumentante, ke ĝi estas misa, poste supozeble pro juraj kialoj. Tamen la vera motivo verŝajne estis, ke la studo ne nur traktis kazojn de la misuzo, sed ankaŭ iliajn kialojn (katolikan moralon kaj needziĝon de pastroj) kaj rekomendis reformojn.

La skandalo pri misuzoj kaj la rolo de episkopoj en ĝi elvokis ondon de kritiko kaj amason da eksiĝoj. Nur en 2019 eksiĝis rekorde 272 000 katolikoj. Samtempe malkreskas la nombro de regulaj vizitantoj de preĝejoj. Nur 10% da katolikoj regule partoprenas diservojn. Intertempe eĉ pluraj katolikaj teologoj avertas, ke sen profundaj reformoj la katolika eklezio fariĝos fundamentalisma sekto. Ĉu germanaj episkopoj trovos la kuraĝon kaj volon por reformoj? Nu, la estonteco montros, sed mi dubas.

# Alergia reago al la usona religia dekstro



(Win McNamee / Getty Images)

Malpli ol duono de usonanoj apartenas nuntempe al preĝejo, sed religio – kaj precipe kristanismo – daŭre havas grandegan influon en usona politiko. Nur 47% de la usona loĝantaro estas membroj de preĝejo (ĉu kristana, islama, juda aŭ alia), laŭ nova enketo de Gallup, kompare kun 70% antaŭ du jardekoj – parte ĉar t.n. "jarmiluloj" (angle "millennials", homoj naskitaj ĉ. inter 1980 kaj 1995) ne plu interesiĝas pri religio, sed ankaŭ parte kiel reago al la miksado de dekstra politiko kaj kristanismo efektivigata de la Respublikana Partio. Respublikanoj en kelkaj ŝtatoj efektivigas ekstremajn "kristan-naciismajn" politikojn, strebante trudi sian version de kristanismo al pli kaj pli neinteresata publiko.

Gallup komencis demandi usonanojn pri ilia konfesia membreco en 1937 – kaj dum jardekoj la nombro ĉiam superis 70%. Tio komencis ŝanĝiĝi en 2000, kaj la nombro konstante malpliiĝas ekde tiam. La malkresko

estas parte atribuebla al ŝanĝiĝantaj generacioj, kun ĉirkaŭ 66% de homoj naskitaj antaŭ 1946 ankoraŭ membrantaj en konfesio, kompare kun nur 36% de jarmiluloj. La malkresko de konfesia membreco elstaras inter demokratoj kaj sendependuloj. Inter demokratoj, la nombro de konfesianoj malpliiĝis je 25% en la lastaj 20 jaroj, dum inter sendependuloj je 18%. Inter respublikanoj, konfesianoj ankaŭ malpliiĝis, sed nur je 12%.

David Campbell, profesoro kaj la estro de la fako de politika scienco de la Universitato Notre Dame kaj kunaŭtoro de *Secular Surge: New Fault Line in American Politics* ("Sekulara Ondo: Nova Fendo en Usona Politiko"), diras, ke la kialo por la malkresko inter tiuj grupoj estas politika: "alergia reago al la religia dekstro". "Multaj usonanoj – precipe junuloj – vidas religion kiel ligitan kun politika konservativismo, kaj la Respublikana Partio specife," diras Campbell. "Ĉar tio ne estas ilia partio aŭ ilia politiko, ili ne volas identigi sin kiel religiaj. Junuloj havas aparte alergian reagon al la percepto, ke multaj usonaj religioj kontraŭas GLAT-rajtojn. *[GLAT = gejoj, lesbaninoj, ambaŭseksemuloj kaj transgenruloj – Red.]*."

La esploroj de Campbell montras, ke kreskanta nombro da usonanoj forlasas religion, ĉar politikistoj – precipe respublikanoj – miksas religion kun sia politiko. Laŭ li, ĉiam estis flusoj kaj malflusoj en usona aliĝo al religio, sed li opinias, ke la nuna malkresko probable daŭros. "Mi vidas neniun signon, ke la religia dekstro kaj kristana naciismo malaperas – kio siavice sugestas, ke la alergia reago daŭre vidiĝos – kaj tiel pli kaj pli da usonanoj forlasas religion," li diras.

La nombro da homoj, kiuj identigas sin kiel nereligiaj kreskas konstante en la lastaj jardekoj, laŭ Michele Margolis, vicprofesoro pri politika scienco ĉe la Universitato de Pensilvanio kaj aŭtoro de *From Politics to the Pews* ("De Politiko al Preĝejo"). Pli ol 20% da usonanoj, kaj pli ol triono sub la aĝo de 30 jaroj, estas klasigitaj kiel "nespecifuloj", laŭ Margolis. "Tio signifas, ke neidentiĝo kun iu religio daŭre kreskos inter la loĝantaro," ŝi diras. Sed ŝi konsentas, ke alia faktoro estas la miksado de politiko kun teismo fare de la dekstro. "Ĉar religio estas proksime ligita kun konservativa politiko, demokratoj forlasas organizitan religion, aŭ partoprenas malpli en ĝi, dum pli da respublikanoj aliĝas".

Kristanaj naciistoj – kiuj kredas, ke Usono estis establita kiel, kaj devus resti, kristana lando – puŝas gamon da rimedoj por trudi sian version de religio en la usonan vivon. En pluraj ŝtatoj, respublikanoj enkondukis leĝojn, kiuj diversmaniere malpliigus GLAT-rajtojn kaj reproduktajn rajtojn, kontestus la rajton de samseksaj paroj adopti infanojn kaj trudus religion en klasĉambrojn. La ŝtatestro de Arkansaso ĵus aprobis leĝon, kiu permesas al kuracistoj kaj aliaj san-laboristoj rifuzi kuraci GLAT-homojn pro religiaj kialoj. Montano estas aprobonta leĝon, kiu permesus al homoj kaj entreprenoj diskriminacii la GLAT-komunumon surbaze de religio.


Alison Gill, vicprezidanto pri leĝaj kaj politikaj aferoj ĉe American Atheists ("Usonaj Ateistoj"), aŭtoro de raporto pri la ŝtel-progreso de kristana ekstremismo en Usono, avertas, ke la malkresko de religia aliĝo en Usono povus fakte akceli tiun strebadon, anstataŭ malrapidigi ĝin.

"Enketoj de tiuj, kiuj identigas sin kun kristanaj naciismaj kredoj regule montras, ke ĉi tiu grupo sentas sin submetita al pli da diskriminaciado kaj marĝenigado ol iu ajn alia socia grupo, inkluzive de islamanoj, nigruloj, ateistoj kaj judoj," diras Gill. "Ili spertas sian perdon de graveco en la usona kulturo kiel neakcepteblan atakon kontraŭ siaj kredoj – kaj tio instigas grandan parton de ilia strebado reteni potencon, subfosi demokration kaj batali por protektado de la 'religia libereco', kiu validas nur por ili."

Laŭ Gill, la influo de religio sur politiko estas forta. "Usono vidas sin ĉefe kiel religia socio, eĉ se la faktoj ne plu kongruas kun tio. Politikistoj ofte sentas sin devigataj deklari sian religian kredon – kaj estas atakataj se oni perceptas mankon de ĝi", ŝi diras.

Dum la danĝero de dekstra kontraŭfrapo estas reala, Annie Laurie Gaylor, kunfondinto de la Freedom From Religion Foundation ("Fondaĵo pri Libereco disde Religio"), opinias, ke datumoj de Gallup sugestas, ke Usono moviĝas en pozitiva direkto. "Ni havas konstitucian apartigon de eklezio kaj ŝtato en Usono. Nia konstitucio estas sendia, kaj laŭ ĝi, ne estas permesate postuli religian teston por publika ofico, tamen vi devas klare montri sian religiecon por esti elektita," ŝi diras. "Homoj formoviĝas de la religio, kaj ni tre ĝojas vidi tion. Ni pensas, ke estas bonege, ke usonanoj finfine vekiĝas."

*Artikolo publikigita en la retejo de The Guardian sub la titolo "Allergic reaction to US religious right fuelling decline of religion" kaj tradukita (kun modifoj) de la redakcio de* Ateismo.




*(Kunaŭtoro: Marian Zdankowski)*

# Kultura-religia batalo en Israelo



*Ultra-ortodoksuloj protestas en Jerusalemo (Yonatan Sindel/Flash90)*

*En la hodiaŭa Israelo okazas pli kaj pli akra konflikto inter modernaj sekularaj tendencoj kaj religiaj streboj. Politikaj partioj estas bazitaj sur mondkonceptoj, sed krome la religiaj partioj ofte estas organizitaj laŭ devenoj. Pri tiu kultura-religia-politika batalo aperis la ĉi-suba artikolo en iu israela gazeto. Jam ne freŝa – sed ĉiam aktuala. En la konflikto inter sekularuloj (ĉefe aŝkenazoj, sed ankaŭ kleraj homoj alidevenaj) kaj kredantoj, ĝi vidas kolizion inter Okcidento kaj Oriento.*

*La israela loĝantaro hodiaŭ nombras 9,3 millionojn. El ili 6,6 milionoj estas judoj: la prapatroj de pli ol duono devenas el islamaj landoj en la Mezoriento kaj Nordafriko, la ceteraj estas eŭrop-devenaj, eĉ se ili venis de Usono, Sud-Ameriko, ktp. (=aŝkenazoj). (La sekvaj generacioj estas jam miksitaj.) 47% estas sekularaj, 13% strikte ortodoksaj (en nigraj vestoj) el kiuj parto eĉ ne rekonas la ŝtaton(!), 10% naciismaj-religiaj (en civilaj vestoj), la ceteraj tradiciemaj, sed ne praktikantaj la kredon.*

*En la nuna parlamento troviĝas du grandaj partioj, kies programoj baziĝas sur la ortodoksa religia mondkoncepto. Unu partio ampleksas ekskluzive orientajn judojn. Do, se vi agitas kontraŭ iliaj religiaj kutimoj, ili*

*akuzos vin pri rasismo kontraŭ orientaj judoj. La alia ortodoksa partio estas pure aŝkenaza kaj severe gardas la kutimojn de la Pollando de antaŭ 500 jaroj. Nun eniris la parlamenton tria religia partio - ili estas junaj homoj (en normalaj vestoj) kaj forte naciismaj, militemaj.*

Jen la gazeta artikolo:

Alvoko al ĉiuj laŭdantoj de la "orientaj" religi-bazaj partioj unuflanke kaj al la profesiaj plorantoj de la "perditaj tradicioj de la prapatroj" aliflanke:

La sekvan fojon, kiam vi havos koratakon, rezignu pri kateterado, kaj metu kokan kruron sur vian kapon - la medikamenton de via avino.

La sekvan fojon, kiam vi volos havi infanon kaj vi havos malfacilaĵojn pri tio, rezignu pri la altnivelaj fekundigaj servoj de la hospitaloj, kaj eliru al Galileo por ĉirkaŭiri sepfoje la tombon de la sankta justa Baba Kusama.

La sekvan fojon, kiam vi volos publikigi viajn pensojn, forlasu la komputilon, la programojn evoluigitajn de la progresintaj noventreprenoj en nia lando, kaj revenu al skribado sur pergameno, aŭ al signaloj per fajroj kaj al kriegoj (kion vi efektive faras en la parlamento ĉiuokaze).

La venontan fojon, kiam vi subskribos ian ajn leteron aŭ publikaĵon, ne insistu aldoni la titolon "doktoro" de universitato, je kiu vi ja ne kredas, kaj kies valorojn vi malestimas.

La venontan fojon, kiam vi kurbiĝos en la sekurejo, kiam raketoj falos sur viajn kapojn, ignoru la "Feran Kupolon" kaj diru Psalmojn, aŭ atendu nian patrinon Raĥel por protekti vin.

La sekvan fojon, kiam vi, pro abomeno al la okcidenta kulturo, alvokos al detruado de ĉiuj ĉi evoluoj kaj sukcesoj, kiujn la fondintoj de nia lando antaŭvidis kaj aspiris, kaj al irado malantaŭen… la sekvan fojon, kiam vi mokos tiujn milionojn da orientaj judoj, kiuj "okcidentiĝis" laŭ via juĝo, ĉar ili vidis la bezonon por progreso, por moderna viv-koncepto, kaj ne komencas plori kaj prilabori artefaritajn "mon-distribuajn" teknikojn, sed fidas en si mem por progresi *[La ŝtato subvencias studentojn de ultra-ortodoksaj religiaj altlernejoj, kie ili longe studas anstataŭ labori kaj evitas militservon, kaj krome, ili havas grandajn familiojn, kiuj profitas de infan-subvencioj; religiaj partioj ĉiam tenas la potenc-ekvilibron kaj provas ĉerpi pli da mono por la ortodoksuloj – Red.]…* la sekvan fojon, kiam vi juĝos ies ajn kontraŭan opinion je "aroganteco" kaj "rasismo" por ekbruligi pasiojn kaj provi gajni kelkajn mizerajn politikajn poentojn… metu kuniklan piedon aŭ prepucion de bebo sur vian kapon, iru kaj atendu miraklon!

*Tradukita de* ***Gabi Zeevi (Israelo),*** *kiu ankaŭ verkis la antaŭvorton por tiu ĉi artikolo.*

# Interreligiaj paroj persekutataj en Barato




*"Amo ne estas krimo" – virinoj protestas en Barato (Getty Images)*

Novaj kontraŭkonvertaj leĝoj, kiuj krimigas interreligian amon, maltrankviligas hinduajn-islamanajn parojn. Nun ili alfrontas la koleron ne nur de siaj familioj, sed ankaŭ de la registaroj de barataj ŝtatoj.

La fera pordo malfermiĝas nur sufiĉe por ke la knabino elrigardu. Ŝi aspektas timigite. Ayesha (*Ajeŝa*) kaj ŝia koramiko, Santosh (*Santoŝ*) (ambaŭ nomoj estas ŝanĝitaj) estas fuĝantaj. "Miaj gepatroj venis serĉi min kaj ili estas ie ekstere," diras Ayesha. "Ni timas. Oni petis nin resti interne." La paro, ambaŭ 29-jaraj, fuĝis de sia hejmurbo en la okcidenta ŝtato Guĝarato. Nuntempe ili loĝas en sekura domo en Delhio. Ankaŭ kaŝas sin kun ili alia paro el la ŝtato Utarpradeŝo (UP) en norda Barato.

En novembro 2020, Utarpradeŝo fariĝis la unua ŝtato, kiu aprobis leĝon malpermesantan "kontraŭleĝan konvertadon" per perforto, trompo aŭ geedziĝo. *[Pri geedziĝoj, temas pri situacioj, kiam en interreligia geedziĝo unu membro de paro konvertiĝas al la religio de la alia - Red.]* Ĝi estis respondo al tio, kion dekstrulaj hinduaj grupoj nomas "am-ĝihado", islamofobia konspir-teorio, laŭ kiu islamaj viroj strebas enamigi hinduajn virinojn kun la sola celo konverti ilin al islamo.

La leĝo kondukis al multaj kazoj kaj arestoj en UP, ŝtato regata de la hindu-

naciisma Barata Popola Partio (Bharatiya Janata Party - BJP). Madjapradeŝo, alia ŝtato regata de la BJP, jam aprobis similan leĝon kaj ankaŭ aliaj, inkluzive de Guĝarato, pripensas ĉu fari la samon. Do paroj nun forlasas tiujn ŝtatojn por geedziĝi en lokoj, kiujn ili konsideras "pli sekuraj" kiel Delhio.

Interreligiaj geedziĝoj en Barato estas registritaj laŭ la Speciala Geedziĝ-Leĝo, kiu postulas 30-tagan aviz-periodon, kiun paroj ofte travivas timante reprezaliojn, des pli en ŝtatoj kun kontraŭkonvertaj leĝoj. *[Fakte la leĝo celis faciligi sekularajn geedziĝojn, tamen ĝi montriĝis dutranĉa glavo, ĉar la aviz-periodo ebligas kontraŭstarojn de familianoj. Aviz-periodo ne ekzistas sub la hindua kaj aliaj religiaj geedziĝ-leĝoj – Red.]* Ĝi estas plia obstaklo en la 12-jara rilato de Ayesha kaj Santosh. Konatiĝinte en kolegio en Guĝarato en 2009, ili amikiĝis kaj proksimiĝis. Du jarojn poste, ŝi fine demandis lin, ĉu li amas ŝin. Santosh ja amis ŝin, sed li ankaŭ sciis, ke la vojo antaŭen estos malfacila en Guĝarato, ŝtato, kie interreligiaj streĉiĝoj fortas.

Ili ambaŭ apartenas al la meza klaso de Barato. Sed Ayesha estas islamano dum Santosh estas hinduo. Ili ambaŭ memoras la jaron 2002, kiam pli ol 1 000 homoj, plejparte islamanoj, mortis en tumultoj en Guĝarato, sekve de trajnfajro, kiu mortigis 60 hinduajn pilgrimojn. Islamanoj estis kulpigitaj pro la fajro. Ĝi estis unu el la plej malbonaj epizodoj de religia perforto en Barato. Ayesha kaj Santosh, kiuj kreskis en ĝia ombro, bone konsciis pri la postsekvoj de amo, kiu estas konsiderata ekster la limoj. "En Guĝarato, esti interreligia paro estas granda problemo," diras Santosh. "Vi ne rajtas renkontiĝi, vi ne povas paroli, vi ne povas fari ion ajn." Sed ili estis neŝanceleblaj.

Post sia diplomiĝo de kolegio en 2012, ili malofte renkontiĝis, sed kiam ili faris tion, ĝi estis la rezulto de zorga planado. Ili renkontiĝis en publikaj lokoj – kaj nur mallonge – por ne veki suspekton. Dum la cetera tempo ili restis en kontakto telefone. "Ni konservis reciproke niajn numerojn sub falsaj nomoj aŭ vokis de aliaj telefonoj," klarigas Santosh. Ĉar la familio de Ayesha kontrolis ŝiajn vokojn, li ofte imitis virinan voĉon kiam li vokis ŝin.

Kiam la gepatroj de Santosh eksciis pri la rilato, ili devigis lin fianĉiĝi kun alia junulino pasint-novembre. "Mi estis deprimita dum tagoj. Mi ne povis paroli kun Ayesha, ĉar ankaŭ ŝia familio eksciis tiam." La patro kaj frato de Ayesha premadis ankaŭ ŝin por edziniĝi al alia viro.

Do Santosh kaj Ayesha provis geedziĝi en Guĝarato – ili petis registriĝon de la geedziĝo laŭ la Speciala Geedziĝ-Leĝo. Sed la oficisto, kiu vidis la nomon de Ayesha en la dokumentoj, avertis ŝian patron. Santosh pagis al advokato 25 000 rupiojn (290 eŭrojn) por registri ilian geedziĝon, tamen la advokato ne plenumis la peton. "Neniuj oficialuloj konsentis helpi. Neniuj advokatoj akceptis nian kazon. Ili diris, ke ĉi tio estas interreligia geedziĝo kaj estas danĝere por ili. Ili konsilis, ke ni ne faru ĝin."

La tempo malpliiĝis. Do la paro decidis fuĝi. "Mi volis esti kun Ayesha. Ni ne havis alian elekton," diras Santosh. En januaro ĉi-jare, ili flugis al Delhio esperante finfine geedziĝi. Dum la flugo ili povis pasigi horojn kune por la unua fojo en sia rilato. Kiam ili alvenis, ili serĉis la oficejon de Dhanak, la organizaĵo, kiu administras la sekuran domon. Ili informis siajn gepatrojn kaj la respektivajn policejojn, ke ili estas en Delhio. Baldaŭ ili translokiĝis al la sekura domo. Dhanak faciligas interreligiajn geedziĝojn – ekde la aprobo de la nova leĝo en UP, la organizaĵo ricevas multajn vokojn de paroj, kiuj volas geedziĝi.

Santosh kaj Ayesha maltrankvilas kaj timas, sed ili diras, ke fido unu al la alia subtenas ilin. "Amo signifas oferadon", laŭ Ayesha. Almenaŭ provizore ili havas loĝejon kaj estas kune. "Oni diras, ke la amo estas blinda, sed estas la malamo, kiu estas blinda", deklaras Santosh.

*Artikolo publikigita en la BBC-retejo sub la titolo "India's interfaith couples on edge after new law" kaj tradukita (kaj iom mallongigita) de la redakcio de* Ateismo.

# Junaj tunizianoj fariĝas daŭre malpli religiaj

Laŭ lastatempa studo de Arab Barometer, religia sento malkreskas tra la tuta araba mondo. Realigita inter 25 000 personoj en dek landoj de la araba mondo, tiu opini-enketo montras, ke la parto de la loĝantaro, kiu identigas sin kiel nereligia eĉ superas 45% inter 18-29-jaruloj en Tunizio. Tio ŝajne estas postsekvo de la konstitucio de 2014.

La konstitucio garantias liberecon de konscienco, kio favoras la kreskon de libereco de religio. Tio estas signo de demokratia progreso laŭ Abderrazak Sayadi, profesoro pri kompara religio kaj civilizo:

"Mi vidas en tio ĉi demokratian maturiĝon. Nuntempe, junuloj aŭdacas defii religiajn tabuojn kaj aserti: 'nu, mi ne estas religiulo, mi ne praktikas', aŭ 'jes, mi estas ateisto'. Fakte, Tunizio estas la sola araba lando, kiu permesas asocion klare batalantan por ateismo. Tio ne ekzistas en aliaj islamaj landoj."

Eĉ por junaj praktikantoj, la ebleco deklari sin kredanto aŭ nekredanto konfirmas malfermiĝon. "Mi estas religia, mi estas islamano," asertas Aziz, junulo 19-jara. "Jes, tio estas ia libereco. Kvankam Tunizio estas islama lando, ĉiu povas kredi je io ajn, kion tiu deziras."

La alveno sur la politika scenejo de partioj, kiuj sin deklaras islamaj plirapidigis

la religian seninteresiĝon pri religio, laŭ Sayadi. "Mi opinias, ke je iu momento, junuloj kredis, ke la religiaj partioj estas pli puraj aŭ pli piaj, sed ili poste vidis tiujn partiojn agadi: ili fakte ne estis malsamaj ol la aliaj partioj. Tio kaŭzis inter la junularo veran kaj profundan malakcepton de religia praktiko kaj de religio mem. Kiam vi havas inter 18 kaj 30 jarojn, viaj prioritatoj ne nepre estas pieco kaj religio."

*Artikolo aperinta en februaro 2021 en la blogo "Neniam Milito Inter Ni" kaj modifita de la redakcio de* Ateismo*, kiu dankas al Anthony Bodineau pro lia atentigo pri tiu ĉi teksto.*



*Juna tunizianino ĉe manifestacio por genra egalrajteco (AFP)*

# ATEISMO

## ENHAVO


**Vorto de la Redaktoro**

**Ateisma Vivo**

Ateistoj: ekstaru por esti nombrataj! 3

Ĝis kiu grado vi kaŝas vian ateistecon? (9 kontribuoj) 5

Ĉielo, infero? 12

Nekredemo jam ekde lernejaj jaroj 13

**Historiaj Perspektivoj**

La liberpensa mezepoka imperiestro 15

**Ĉirkaŭ la Mondo**

La krizo de la katolika eklezio en Germanio 21

Alergia reago al la usona religia dekstro 23

Kultura-religia batalo en Israelo 26

Interreligiaj paroj persekutataj en Barato 28

Junaj tunizianoj fariĝas daŭre malpli religiaj 30



Bonvolu sendi viajn artikolojn al la redaktoro:
ateismo.bulteno@gmail.com
Por informoj bonvolu skribi al la sekretario:
anna.lowenstein@esperanto.org

Prezidanto: Giridhar Rao, Barato
Vicprezidanto: Dominique Simeone, Francio
Sekretario: Anna Lowenstein, Britio
Kasisto: Dieter Rooke, Svislando
Redaktoro: Nyegosh Dube, Pollando
Lingva kontrolo: Anna Lowenstein, Britio; Christian Rivière, Francio
Grafikisto: Lautaro Croce, Argentino

Jarkotizo: 10 eŭroj (A-landoj) / 8 eŭroj (B-landoj)
Konto: ateo-y ĉe UEA